

tejo

tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



Komunikado:
Retlando

Denove Katalunio
Skandalo

La prezidanto pri
Strategio

Enhavo

- 3••Kian strategion por TEJO?
- 7••Eŭropo aktivas bunte
- 9••Katalunoj skandalumas
- 11•Prepariĝu por Koreio
- 12•Plenkreskule en IJK
- 13•Karavanu al Koreio!
- 15•Vage tra Sudameriko
- 17•Eĉ en Usono estas junularo
- 19•Pli da demokratio en TEJO
- 21•Skoltoj internaciigu!
- 23•Bonvenon al Retlando!
- 26•Printempa kalendaro
- 27•Ne ofendu la putinojn!
- 29•Pli pri la naciisma debato
- 31•Kurte
- 33•Lingva angulo

Saluton!

Jen la vintra numero de TT. Denove mi ne sukcesis tute eviti skandalumon, kaj ankoraŭfoje kulpas la katalunoj — mi rifuzas akcepti la respondecon pri la ĉi-foja skandalo, kiu aperas sur paĝo 9.

La trian paĝon, kie ĝis nun aperis ĉefe skandaloj, ricevis ĉi-numere la prezidanto de TEJO, kiu preskaŭ senpapage sed ne sensagace rezonas pri la strategio de TEJO. Tamen mi ne certas, ke ĉiuj legantoj samopinios kun ŝi pri ĉio. Ĉu vere ni pli-malpli rezignu pri la ekssocialismaj landoj kaj la tria mondo, ĉar homoj tie ne havas financajn eblecojn okupiĝi pri Esperanto? Diru vian propran opinion pri la strategio de TEJO en la sekva numero!

Al la ekssocialismaj landoj kaj la tria mondo iasence rilatas ankaŭ la temo de la sekva numero — *esperantista solidareco*. Kiel la plimulto de la junaj esperantistoj, loĝanta en relative riĉaj okcidentaj landoj sintenu al siaj malpli bonŝancaj samideanoj, kiuj eble ĝuste nun suferas ne nur de monmanko, sed pro sanga milito? Ĉu indus fari ion?

kk

Redaktofino por TT 2/94: la 1-a de marto

Por la sekva numero mi speciale bonvenigas kontribuojn pri **solidareco** — kiel vi komprenas tiun koncepton, ĉu indus aŭ eĉ endus, ke ni, la relative bonŝancaj kaj riĉaj okcidenteŭropaj (usonaj, japanaj...) esperantistoj ion faru por helpi tiujn, kiuj suferas pro milito aŭ simila teruraĵo. Aŭ ĉu estus cinike direkti sian helpon unuavice al esperantistoj? Volonte ankaŭ ekigu debaton pri strategio. Sendu fotojn kun viaj raportoj, kaj sendu ĉion ĝustatempe, tekstojn volonte surdiskete aŭ plej preferinde retpoŝte.

La redakcia adreso: **Kalle Kniivilä, S:t Hans gränd 30 B, S-22642 Lund, Svedio. Telefono +46-46-123919; fakso +46-46-146582** (indiku: por TEJO tutmonde); retpoŝta adreso: **kniivilae@gemini ldc.lu.se**.

Satelitas: Hilarina Aires, Saskia Idzerda, Jelena Lebedeva, Aleksandar Ŝivarov, Sabira Ståhlberg, Edlyn Teske, António Martins. Papagoj: Martin Burkert, frontpaĝo: Franko Luin. Presigas Maciej Wnuk, tel. +48-2-6335315.

Kian strategion por TEJO?

Kion vi pensis kiam vi legis en la lasta numero de TT: "en la venonta numero: kia strategio por TEJO?" Eble vi fervore antaŭĝojis (?), au eble vi tute ne rimarkis... mi hazarde ja vidis la anoncon, kaj pensis: "Ho... verŝajne la prezidanto devus kontribui ion pri tiu temo..."

Eble la temo "strategio" tute ne allogas vin (dankon ke vi tamen eklegis la artikolon!). Tion mi bone komprenus; fakte kiam mi komencis prezidantumi en TEJO, mi ĉiam forpuŝis ĉiujn temojn kiuj iel odoris je strategio. Mi pensis: "La Fina Venko ne estas mia tasko; mi devas funkciigi TEJO-n!" Mi estas praktikema, kaj preferas konkretajn projektojn al grandaj planoj. La Estraro dum la pasinta mandato tamen sukcesis sufiĉe bone funkciigi nian asocion, tiel ke fakte venis la tempo por iom rigardi preter la ĉiutagaj taskoj.

la nuna situacio

Kio estas TEJO? Ĝi estas internacia asocio, kun membroj el du specoj: Landaj (kaj Fakaj) Sekcioj kaj Individuaj Membroj. Tridek kvin LS-oj, du FS-oj, naŭcento da IM-oj. Krome ĝi havas estraron kaj kelkajn manplenojn da cirkaŭaj aktivuloj, plus la kunlaboron de la laborantoj en la Centra Oficejo.

Imagu ke vi estas juna aktivulo en X-lando, kie ekformiĝis junulara Esperan-

to-asocio (ni divenu... verŝajne kun la nomo X-landa Esperanto-Junularo). Kial XEJ volus iĝi Landa Sekcio de TEJO?

Verŝajne la plej grava kialo por aliĝi al TEJO estas la iom nedifinebla "sento, esti parto de la internacia movado".

Tio tute ne estas maltaŭga kialo: la internaciemo estas baza sento en nia komunumo, simple ĉar Esperanto nur ekhavas sencon en internacia medio. Sed ĉu ĝi estas la ĉefa kialo por aliĝi al TEJO? Jes, simple ĉar la aliaj avantaĝoj ne estas

tre grandaj. Ekzistas kel-

kaj: via asocio estos en la internacia informfluo, ĉar vi ricevos *TEJO tutmonde* kaj povos diskonigi vian agadon en ĝi. Vi havos voĉon en la Komitato de TEJO. Vi povas inviti la IJK-n al via lando (kio cetere povos tre vigligi, aŭ mortigi vian asocion...).



”Sed,” vi eble demandas nome de XEJ, ”ni ja esperas ke TEJO helpas nin, se ni estos Landa Sekcio!” Al tio la respondo estas ke bedaŭrinde TEJO **ne** povas doni al vi grandan helpon: TEJO havas kapablojn kaj spertojn, sed ĝi malhavas homojn kaj monon.

Por XEJ kaj la aliaj Landaj Sekcioj tio havas malsamajn sekvojn. TEJO jes ja povas helpi al la novaj, ”junaj” asocioj per siaj spertoj: la TEJO-aktivuloj kutime konas siajn proprajn landajn sekciojn kaj povas konsili al la nova asocio pri organizado, varbado, kion jes kaj kion ne fari.

Aldoniĝas eble iom da materia helpo, en formo de revuoj, gazetoj ktp. Sed multaj estas la aferoj kiujn ni bedaŭrinde **ne** povas grandskale fari: ekz-e organizi prelegvojaĝojn, sendi kursmaterialojn, kunvenigi la landajn gvidantojn en internaciaj kunvenoj ktp. Ĝuste tiaj servoj de TEJO ankaŭ tre utilis al la pli ”maljunaj” Landaj Sekcioj, kiuj jam posedas tiajn spertojn kiajn ankaŭ TEJO havas — sed mankas homoj kaj mono. Ĉe la pli maturaj Sekcioj, la plejparto de niaj LS-j, temas do ne pri **helpo** sed pri kunlabora rilato kun TEJO.

Momenton — mi sonas eble iom tro pesimisma. Pri la supremenciita agado ni ne tute rezignas! Klaus Dahmann, estrano pri Landa Agado, ĉi-vintre vojaĝos en Balkanio por prelegi, kontakti, instrui: sed temas pri malgranda paŝo, kian permesas niaj rimedoj. Ankaŭ la kresko de la internacia kunlaboro, ekz. pere de MEJK kaj similaj regionaj iniciatoj, estas tre pozitiva evoluo, sed ĝin financas la LS-j mem.

celoj de TEJO

”Se temu pri strategio... kiam ni finfine aŭdos pri la celoj?!” eble vi diras. La celoj de TEJO kaj UEA... troveblas en la Jarlibro, jes (paĝo 9, por la entuziasmoj). Sed mi, ne rigardinte tie, provis mem formuli niajn celojn, kaj trovis eĉ (ne ŝokiĝu!) tri nivelojn da. Sur la **tria**, plej alta nivelo troviĝas la **antaŭenigo de Esperanto**, kio koncernas la nombron de parolantoj, la evoluon de nia kulturo, la pligrandigon de la uzeblecoj kaj la bildon de la ekstera mondo pri Esperanto. Jes: multe da malproksimaj celoj.

Male, la **unua** nivelo estas simple formulebla: **pli**: havigi pli da Landaj Sekcioj kaj Individuaj Membroj al TEJO.

Kaj en la mezo, kio estu la ligo inter tiuj celoj? Sur la **dua** nivelo estas kelkaj celoj kiuj rilatas al ambaŭ: kreskigi la nombron kaj kvaliton de E-aranĝoj kaj aliaj servoj al la esperantistoj; fortigi la ligon inter esperantistoj ĉie en la mondo; kaj informi la ĝeneralan publikon pri la lingva problemo kaj pri Esperanto.

Tiaj agadoj ja samtempe povos altiri pli da membroj en la organizo *kaj* antaŭenigos Esperanton ĝenerale. Sed ni ne subtaksu la unuan nivelon, ĉar la plenumo de la aliaj celoj dependas de la homfortoj disponeblaj.

varbi membrojn

Do ek! Ni varbu multajn membrojn por grandigi TEJO-n! Sed — kiel, kie, kiujn? Unua problemeto estas ke TEJO nur povas varbi homojn kiuj jam iom scipo-

vas Esperanton: ne nur ĉar nia laborlingvo estas E-o, sed ĉefe ĉar niaj servoj — *Kontakto*, *TEJO tutmonde*, IJK k.s. — nur utilas al lernintoj de la lingvo. Tio signifas ke por untaj membroj ni dependas de la varbagado de la Landaj Sekcioj kaj aliaj landaj Esperanto-organizoj. Do, dum momento ni metu nin flanke de ili kaj pripensu la varbadon.

Reklamante Esperanton, ni devas ion oferti, kaj certe ni havas multajn valoraĵojn: internaciajn kontaktojn, amikecon, interesan feriadon. "Kaj ĉu mongajnon?" Ne, monon oni apenaŭ povas gajni per Esperanto: ĝi estas hobio. Bedaŭrinde, la plej granda parto de la homaro ne havas tempon por tia hobio, pro siaj malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj. Ne estas mirige ke ofte en triamondaj landoj interesatoj unue demandas pri financaj avantaĝoj pere de Esperanto; kaj kun la ekonomiaj problemoj en la ekssocialismaj landoj simila sinteno nun ofte troveblas tie.

Certe Esperanto povus esti persona pliriĉigo por homoj en tiuj landoj, sed mi bone povas kompreni se ili decidus investi sian energion alimaniere. Kio do restas kiel plej taŭga "merkato" por ni estas la unua mondo, la "riĉa okcidento". Sed hove, ĉi tie ni frontas grandan konkurencon!

Por junaj okcidentanoj ekzistas amaso da eblecoj vojaĝi, kontakti, amuziĝi internacie. Kaj multaj el tiuj eblecoj ne postulas ke oni lernu iun lingvon kiun oni ne jam lernis en la lernejo. Ĉar Esperanton, kiom ajn facila ĝi estas, oni tamen devas lerni: konsiderinda investo kiun oni devas fari antaŭ ol profiti tiujn bonegajn kontaktojn, vojaĝojn ktp. Mi kredas ke tio

estas barilo pro kiu la Esperanto-movado ne baldaŭ sukcesos tre multe kreski.

Tio tamen ne signifas ke ni agas malĝuste! Verŝajne estas limigita nombro da homoj kiuj sufiĉe interesiĝus pri Esperanto por aktive eklerni ĝin — *sed tiu nombro certe ne estas atingita!* Ni devas plu varbi, plu informi pri la lingvo kaj ĝiaj eblecoj. Kaj due, la fakto ke la esperantistoj ne estas kaj ne estos tre multaj ne malplaĉas al mi. Nia movado estas malgranda, sed altkvalita: ĝi entenas multege da kapablaj, inteligentaj, talentaj homoj. Kaj la membraro averaĝe tre aktivas: la diraĵo "En Esperantio, ĉiu estas prezidanto de io" sonas iom malice, sed fakte atestas ke multaj homoj partoprenas en la organiza laboro de la movado.

Pro tiu aktiveco ekz-e nia KER tre bone sukcesas labori inter aliaj, multe pli grandaj organizoj. Ĉi tiel ni venis al la devizo kiun mi menciis antaŭe: TEJO havas kapablojn kaj spertojn, sed ĝi disponas pri nur malmulte da homfortoj kaj — tion mi ne bezonas ekspliki al vi — mono.

strategie — se vi volas nomi ĝin tia

Mi ne povas proponi al vi iun dekjaran batalplanon, sed mi havas ideojn pri akcentoj kiujn ni povus meti en nia agado. "Ni" ĉi tie signifas TEJO-n, ĝiajn Landajn Sekciojn, kaj ĉiujn kiuj iel aktivas pri Esperanto kaj la junularo.

—**Varbi novajn membrojn.** Tio tre gravas same por TEJO kiel por la LS-oj mem, kaj ĝi estas kampo sur kiu ni povus kunlabori internacie. Antaŭ kelkaj jaroj ni provis startigi projekton (kun subven-

cio de eŭropa instanco) kiu provizus varbmaterialojn al pluraj LS-j, sed montriĝis tre malfacile funkciigi internacian komisionon. Ni devos serĉi aliajn vojojn por kunlaboro.

—**Teni novajn membrojn.** Bedaŭrinde regule okazas ke iu lernas la lingvon, iras al unu aŭ du renkontiĝoj, sed poste rezignas pri Esperanto — ne nepre ĉar la etoso de la Esperanto-junularo ne plaĉis al ŝli, sed ĉar ŝli ne vere sentis sin hejme en la grupo. Kvankam nia komunumo ĝenerale estas malfermita al novuloj, ne ĉiam estas facile aliĝi al la bona etoso se oni ankoraŭ neniun konas, speciale por iom timemaj homoj.

Laŭ mi, se ni pli konscios pri tiu problemo, ni povos konservi tre valorajn homojn por la movado. Temas pri malgranda investo de energio, ekz-e eta komisiono de homoj kiuj atentis al la integriĝo de novuloj dum renkontiĝoj, kaj kelkaj taŭgaj programeroj. Ni povus multe profiti el la spertoj de la rusa/sovetia movado sur tiu kampo.

—**Varbi junajn membrojn.** Laŭ diversaj manieroj, multaj el ni sentas emocian ligan al Esperanto. Mi suspektas, konsiderante ekz-e la estraranojn de TEJO kaj UEA, ke tiu ligo estas eĉ pli forta ĉe tiuj kiuj lernis la lingvon frue, inter la aĝoj de 12 kaj 16 jaroj. Tamen nia varbado estas ofte celata al la iom pli aĝa grupo de studentoj. Ni devus pli celi nian varbadon kaj instruadon ankaŭ al lernejoj, kaj samtempe trovi manierojn por uzi la lingvon en tiu aĝo, kiam oni ankoraŭ ne povas tiom libere vojaĝi. Ni povas pensi ekz. pri interŝanĝo kun najbara lando, aŭ

perkomputilaj kontaktoj.

—**Regione kunlabori.** Regiona kunlaboro devus plifortiĝi tie kie la vojaĝado estas kosta; mi pensas pri ekzemploj kiel la komuna seminario de la korea kaj japana junularoj, la afrikaj kongresetoj, kaj la interlanda tendumado de la brazilanoj kaj argentinanoj. Tiaj aranĝoj fortigas la kontaktojn inter najbaraj asocioj, donas la eblecon uzi Esperanton internacie, kaj povas fariĝi alloga vojaĝcelo por eksterlandanoj de pli malproksime. Alia ebleco estas komuna informilo laŭ la ekzemplo de *koncize* kaj *Kvinpinto*: se tia bulteno sukcesas anstataŭi landajn eldonaĵojn, ĝi ankaŭ efike ŝparas energion al la LS-j.

—**Transdoni niajn spertojn.** Dirante ke TEJO havas kapablojn kaj spertojn, mi ne celis ke tio estas daŭra aŭ fiksa situacio: spertojn oni devas akiri kaj transdoni, kapablojn oni devas evoluigi. Tial estas grave konservi kaj transdoni niajn sciojn: ekz-e per publikaĵoj kiel la manlibro pri KER, la IJK-arkivo, kaj la planata manlibro por komitatanoj kaj aktivuloj. Ankaŭ praktike ni provos pludoni spertojn, ekz-e per la trejnseminario en aŭgusto -94.

Jen, kara leganto, se vi eltenis ĝis ĉi tie, mia unua provo formuli mian vidpunkton pri TEJO kaj ĝia strategio. Ne temas pri revolucio, sed pri plifortigo de nia agado en la direkto kien ni jam iras. Estas multaj eblecoj, multe pli ol mi menciis ĉi tie, sed ilia realigeblo dependas de la homfortoj. Ĉu vi jam pripensis kion vi povas kaj volas fari per via homforto?


Saskia Idzerda
prezidanto de TEJO.

Buntaj aktivadoj eneŭrope

Dum la somero Eŭropo laŭkutime aktivis. Tamen laŭtemaj aranĝoj ne plu ŝajnas allogi la amasojn. Franca junularo furoras komputilrete dum katalunoj direktas sin al la ekstera publiko per sia nacilingva revuo, kiu eĉ ne temas unuavice pri Esperanto.

GEJ: ĉu novan strategion?

Malgraŭ tre bonaj loĝkondiĉoj kaj interesa programo (inkl. rokkoncerton de Persone...) nur 15 homoj partoprenis la duan Seminarion *Urboj por vivi*, kiun organizis Germana Esperanto-Junularo en Potsdam pasintan julion. Tiu kvanto estas tre malalta, speciale kompare kun aliaj apudaj samsezonaj renkontiĝoj. Oni povas supozi ke someraj aranĝoj simple tro abundas aŭ ke la ĝenerala publiko ne amase partoprenemas seminarion pri specifa temo (kvankam ja interesa) — kun la ebla escepto de esperanttema aranĝo. Ĉiel ajn tamen, io ŝanĝendas ĝis la venonta somero. (el raporto de Ulrich Görtz, *GEJ-gazeto* 5/93)



JEFO: jaro 2 post renaskiĝo

Per la lasta agadraporto de Junulara Esperantista Franca Organizo (rilata al la periodo 1992.10-1993.09) konstatablas la plifirmiĝo de ĝia aktivado. La dumonata bulteno *JeunEsprantO INFO*, sendata varbekzemplere pomile al lernejoj, unuversitatoj kaj aliaj junulejoj, estas vigla, amuza, 24-paĝa kaj ne tro krokodila.

Fakte, nun la membraro atingis 320, el kiuj nur 85 estas (nejunaj) patronoj. Ja la ĝis nun streĉaj rilatoj kun UFE (la plenkreskula asocio) iom pliboniĝis kaj eĉ du el ties komitatanoj estas JEFO-anoj! La minitela (komputilreta) babil- kaj inform-servo pli kaj pli popularas — kaj ĝi estas tute zorgata de JEFO, same kiel estis la eldono de nova varba T-ĉemizo, inter multaj aliaj agadoj. Defio por la nova jaro estas plivastigo de la lastjara disvolviĝo al eksterparizaj regionoj de Francio. (el raporto de Laurent Vignaud, *JeunEsprantO INFO* 6) La satelita redaktoro emas defii: Kiam do "fĥanca" IJK?

Katalunio: per la lingvo...

La revuo *Freqüenciés*, eldonata de KEJ, estas speciala kazo en la panoramo de la esperanta gazetaro. Al tio ke ĝin komple-

te produktas junulara asocio (kio per si mem estas ja raraĵo...), aldoniĝas ĝiaj impresaj kvalito kaj intereso. Krome ankaŭ ĝia koncepto unikas. *Frequenciés* estas nek en nek pri Esperanto (almenaŭ ŝajne...); ĝi estas revuo por nacilingva publiko kaj tute ne propaganda varbeldonaĵo. Ties temo: kulturoj kaj popoloj (do etno(geo)grafio, etnolingvistiko, lingvo-politiko, k.s.); ties ĉefaj fontoj: *Monato*, *Etnisma*, revuo *Esperanto*, k.m.a. Trafe, ĉu ne? La esperantistoj emas kaj facile povas informi kaj informiĝi pri lingvoj kaj kulturoj, eĉ (aŭ speciale) pri tiuj plej malmulte konataj.

Publikigante tian materialon por interesita nacilingva publiko, oni ne nur nerekte informas pri la taŭgeco de Esperanto kiel komunikilo (kaj ne kiel "estonta" universala fratigilo), sed ankaŭ "kribras" publikon potencie plej interesotan pri Esperanto. Evidente, foje aperas esea artikolo (ne propaganda varbteksto) pri Esperanto dum esperantlingvaj fakaj libroj kaj periodaĵoj estas recenzataj kaj citataj tute nature apud la "normalaj".

Kvankam tre bunta, ĝenerale ĉiu numero de *Frequenciés* temas pri iu difinita temo: aperis jam pri Balkanio, Eks-Sovetio, arab-islama kulturo, 1492 — la jaro de etnekstermoj, Okcitanio. *Frequenciés* estas sperto interesa kaj imitinda (aŭ almenaŭ inspira), kiu, fare de junulara Esperanto-asocio, metas antaŭ la ĝenerala publiko nian lingvon en (sia) kadro de sobra, serioza alternativeco.

António Martins

IEJ: "...svarmas ĉe ni amaso da iniciatoj..."

Itala Esperanto-Junularo kontentas speciale pri la organiza sukceso de sia 17a Internacia Junulara Festivalo, okazinta aprile (unufoje en la italia sudo), kies pertopreno superis la atendon. Tial, jam planatas 18-a IJF, kiu havos toksikojn... kiel temon! (Vidu paĝon 22.) Cetero, kaj krom la teni la "normalajn" rilatojn kun la plenkrekula asocio (IEF) kaj strebi al fondo de pliaj lokaj grupoj, IEJ kunorganizos seminarion pri aktivula trejnado (kune kun TEJO-KER — Komisiono pri Eksteraj Rilatoj) kaj eĉ invitis al itala urbo la 53-an IJK-n, en 1997! (el raporto de **Luigi Fraccaroli**, *Koncize* 107)

nova norvega estraro

Norvega Esperanto-Junularo aranĝis jarkunvenon dum la Nordia Aŭtuna Renkon-tiĝo, ĉi-jare okazinta en Gausdal, Norvegio, en septembro. Nova estraro elektiĝis. La novelektita estraro aspektas tiel: Ulf Lunde, prezidanto (reelektita); Jardar Eggesbo/Abrahamsen, vic-prezidanto (nova); Knut Lyngstad, sekretario (nova); Lars Samdbakk, sekretario (nova); Ivo Leo Spira, landa redaktoro de *Kvinpinto* (reelektita) kaj Jon Arne Holm, estrarano (antaŭe: kasisto). Dum la Nordia Aŭtuna renkontiĝo reprezentantoj el Norvegio, Svedio kaj Finnio diskutis la estontecon de *Kvinpinto* kaj decidis kontakti la Estonan Esperanto-Junularon proponante kunlaboron.

la eŭropan rubrikon kompilis:

António Martins

Prisekse senseksume(?)

Jen denove aperas skandalo, kaj denove kulpas la katalunoj. Ili aŭdacis aranĝi priseksan umadon, en kiu ili profanigis nian karan lingvon. Pri la maldeca lingvaĵo en la artikolo respondecu la aŭtoro mem, do viajn indignajn plendojn vi povas sendi rekte al Katalunio. Ankaŭ pri la enhavo ne kulpas TT.

La KEJ-diskutkunveno pri sekso en Esperanto en La Farga (Sant Celoni) okazis de la 30a de oktobro ĝis la 1-a de novembro 1993. La tria diskutkunveno de Kataluna Esperanto-Junularo gajnis merititan spacon en la esperanta historiografio. Ĉirkaŭ duoncento (tiel sonas pli pompe ol "preskaŭ kvindek") da verdulaj kaj ne tiom verdulaj spiritoj partoprenis la eventon kun du fi-ideoj en ĉies cerbo: kopuli kaj/aŭ analizi kopulecajn profilojn de nia movado. Ambaŭ revoj estis efektivigitaj de elita bonŝanĉularo. La ceteraj homoj onanis, rezignis aŭ deĵoris en la trinkejo.

iberia bunteco, kaj eĉ pli

Menciindas la kultura bunteco de la ĉeestintoj, ĉar partoprenis hispanaj — junaj — esperantistoj; tio estas bonega kaj mi eĉ dirus esperiga. Ili konstatis, ke ni

ne dormigis ilin en necesejo, kaj ni rimar-



kis, ke ili ne kunportis sabotilojn por la renkontiĝo... Ĉu tio signifos novan periodon en la rilatoj inter hispanoj kaj katalunoj? Ili plu venu kaj ni plu iru!!

Ankaŭ partoprenis galego, valencianoj kaj aŭstro, nome Helmut Brath, kiu regalis nin per siaj oratoraj kapabloj, prelegante pri geja emancipiĝo kaj pri aideso.

Hèctor Alòs i Font parolis pri tabuaj esprimoj en Esperanto, Georgo Kamaĉo pri ĉu porni aŭ ne porni en Esperanto, Antonio Valén pri erotika literaturo en nia kara lingvo kaj Abel Montagut i Ma-

sip pri la amkantoj de la kataluna poeto Ausiás Marc.

distro kaj manĝado gravis

Inter la distra programo, mi rimarkigas noktan balon kun debuto de profesia muzikisto, sesdekjarajn pornajn filmojn en super-8 (ĉu tio akordigeblas kun poste kunhavita litaro!?), kursojn pri dancoj, ludojn por forpeli malfidon, sekskonduktan enketon (rezultojn legu en la venonta, 30a numero de *Kata-Luno*) kaj aliajn programerojn, kiuj eskapas mian memorkapablon.

La manĝaĵo estis eksterordinare bonguste aranĝita de multnombra laborgrupo. Kiel kutime, fumantoj estis traktitaj kvazaŭ murdistoj kaj pelitaj en koncentrejon. Ankaŭ estis iu afrodizia noktomanĝo por pruvi la eltenon de esperantistoj en absurda kaj senkiala ĉies dormejo.

Fakte, ĉiuj kontentis pri ĉio. La nirvaniĝintaj mienoj de inoj kaj malinoj briligis la kunvenon tiagrade, ke ideala vetero akompanis sunon en malvarma parto de la varma Katalunio, kia estas la montaro Montseny (Munsenj').

planatas pliaj skandaloj

Nur tiu, kiu deĵoris en la trinkejo ne ĝuis la ĉielan lumon. Preskaŭ neniu kompatas lin. Nur kelketaj ĉiamaj amikoj konsilis lin petante la seminarian drinkaĵon: la tiel nomatan Sangosoifan ElikSION, faritan el tekilo, tomatsuko kaj sekreta cetero.

Sed la sukceso estis tia, ke oni planas aranĝi seriozegan trilogion. Nu, ni jam organizis seminarion pri sekso, la venonta temas pri drogoj, kaj la lasta pri rokenrolo. Sekso, drogoj kaj rokenrolo... en Esperanto!

La domo estis granda, bela, pura, antikva, kaj kun komuna ĉambro, kiu tamen ne faciligis seksumon ekzemple per orgioj, sed nur efikis kiel koito-interrompilo, tiel ke la bonŝancula elito serĉis kaj trovis taŭgajn lokojn por praktiki la dumtagajn ellernitaĵojn. Mi dirus al vi, kiuj estis tiuj lokoj, sed mi deĵoris en la trinkejo!

Felip Artero i Lozano

Katalunio

PS: Kiu deziras havi la 80paĝan seminarian dosieron, laŭ Felip interesege, aĉetu ĝin pagante 800 pesetojn al la UEA-konto de Kataluna Esperanto-Asocio. Ankaŭ haveblas aliaj seminariaj dosieroj, ekzemple pri la kulturaj valoroj de Esperanto. Pri la enhavo de tiuj dosieroj la redakcio de TT nenion scias, do poste ne kulpigu nin.

+++ esperantistaj gastoj serĉatas +++ kvinopa familio en francio deziras gastigi eksterlandanojn +++ skribu al françoise noireau, les pommiers 14 B, chemin de la tour, f-05100 briançon, francio +++ tel. 92203534

Prepariĝu por Koreio

Laŭ la plej novaj informoj el Koreio, la programo de la IJK estos bunta miksaĵo de tradiciaj IJK-eroj kaj koreaj specialaĵoj. Pri manieroj vojaĝi al la kongresoj rigardu ankaŭ paĝon 13!

Krom nacia, internacia, muzika, teatra kaj danca vespero (kun koreaj maskoj...), okazos laborgrupoj pri ekz. budismo, te-
kŭon-do, herba medicino, kaligrafio, korea te-ceremonio kaj bongŝ-danco (kiu ankaŭ al la verkanto de tiu ĉi raporto sonas tre mistere).

Kadre de la temo, *kultura diverseco*, okazos prelegoj i.a. pri "Kiel venki kulturajn barojn?", "Spertoj pri loĝado en alia kulturo", "Konfucianismo en Koreio, Ĉinio kaj Japanio", "Spertoj de infanoj el interkulturaj geedzeco" kaj "Ŝercoj en diversaj kulturoj". Kaj kompreneble ne mankos kurso pri la korea lingvo, ĵonglado, kaj kantado.

Aliĝilo por la 50a IJK aperis kiel aldonajo al TT 93/4; ekzempleron vi povas peti de la Centra Oficejo aŭ de la **LKK de la 50a IJK. C.P.O. Kesto 7998, Seulo 100-679, Koreio.**

rabatitaj flugoj

UEA negocis favoran kontrakton kun Korean Airlines, kaj povas oferti flugojn al Seulo kontraŭ specialaj prezoj! Depen-

de de la ekirloko, la prezoj de bileto tien kaj reen estos proksimume:

De Amsterdamo: 2100 nlg; de Frankfurto, Londono, Parizo, Romo kaj Zuriko: 2200 nlg; de aliaj urboj en la Eŭropa Komunumo (kun interliga flugo al unu el la nomitaj urboj): 2310 nlg; de aliaj urboj en

Eŭropo (kun interliga flugo): 2360 nlg; de

Toronto: 1215 cad;

de Vankuvero: 1080

cad (Ankoraŭ pridiskutataj estas flugoj

el San-Paŭlo kaj Sidnejo.) Krome eblas al-

doni flugon de Seulo

al Japanio kaj reen por nur 220

nlg.

Nura kondiĉo por

tiuj ĉi rabatitaj prezoj estas ke vi

mendu vian biletton pere de UEA: ne necesas flugi dum iu fiksita dato per unu

aviadilo plena je kongresanoj. El la supre

menciitaj urboj iras ĉ. tri flugoj semajne; vi do mem povos elekti la taŭgajn datojn

por via kongresumado kaj eventuala plia restado en Koreio aŭ Japanio.

Petu mendilon kaj informojn pri la ek-

zaktaj datoj ĉe la **CO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.**

Saskia Idzerda



Kiel eksterulo spertis Vracan

La plej multaj kongresanoj venis al Vraca de okcidente. Tamen ne ĉiuj. Ĉi-sube rakontas pri siaj impresoj irana, jam ne TEJO-aĝa kongresinto, loĝanta en Istambulo. Ŝajnas, ke niaj kongresoj povas forte imponi tiujn, kiuj al kutimiĝis al la pompeco de UK-oj.

Ĉi-jare mi firme decidis deproksime konatiĝi kun la aktiveco de la gejunuloj. Kaj krome vojaĝigi la filon de mia irana amikino.

Jen post unu semajno ni revenis kun du brazilaj samideanoj kaj unu meksikia al Istambulo kun multegaj ĝojoj, plezuroj kaj memoroj. Por mi estis ege interese renkonti tiom da simpatiaj, aktivaj, afablaj kaj flue parolantaj gejunuloj.

pli simpatie ol UK

Ne pensu ke mi troigas, kiam mi diras al vi, ke ĉi tiu kongreso estis por mi pli utila kaj ĝojiga ol UK, kie mi ĉeestis kelkfoje. Unue la partoprenantoj ne estis tiom multnombraj, kaj pro tio oni rapide amikiĝas kaj havas la eblecon interŝanĝi ideojn. La dua kaŭzo estas, ke la kongresanoj ĉiam estas gajaj, energiaj kaj pretaj respondi al vi afable. Tiel ne estas dum UK, kie pro la tumulto eĉ por trovi sian malnovan amikon oni devas perdi multe da tempo.

Tio kaŭzis ke mi almenaŭ volas fariĝi subtenanto, pri kiu ebleco mi antaŭe eĉ

ne havis imagon. Vere la junuloj meritas pli da instigado kaj subteno, ĉar ili estas tiuj, kiuj baldaŭ devas surŝultrigi la gigantan laboron por nia komunalingvo.



La lastan nokton oni kune kantis tre belan kanton, en kiu ripetiĝis "Sola, sola..." Ĝi ankoraŭ sonas en miaj oreloj. Sed ĉi-foje mi ne sentas min sola, kvankam mi reveninte hejmen vidis sur la tablo noton de mia edzo: li dum mia foresto vojaĝis al Sovetio kaj mi devis toleri solecon dek tagojn en fremda lando, eble oni povus diri la dua patrujo, ĉar mi jam antaŭ dek jaroj edziniĝis al turka esperantisto.

Nikolin' vekis memorojn

Do, kial mi reveninte hejmen havas tiel bonan senton? Inter la multaj memoraĵoj kiujn mi aĉetis mi tre ŝatas la kasedojn de Nikolin', kiu dum la inaŭguro koncertis kaj parolis kun bela voĉo kaj bonaj konsiloj al la gejunuloj. Dum la

koncerto miaj okuloj estis plenaj de larmoj — mi memoris pri Gresillon kie mi antaŭ dek kvin jaroj konatiĝis kun multaj samideanoj.

Reveninte al Irano dum la revolucio, mi sen ia kurso aŭ persa vortaro okupiĝis pri korespondado. Dank' al Esperanto kaj miaj karaj instruistoj, gesinjoroj Saheb-Zamani kiuj konatigis min kaj multajn miajn samlandanojn kun Esperanto,

malpliiĝis la sufero de la milito.

Sekve de la korespondado mi post kvar jaroj edziniĝis al viro, kiun mi antaŭe entute ne vidis. Vere la vivo de esperantistoj estas plena de aventuroj, precipe kiam ili geedziĝas trans landlimoj.

Heshmat Yalçin
Istambulo


Trajnkaravanu al la IJK!

Ekveturo el Moskvo la 11-an de junio, alveno al Ĉonan la 30-an, la aliaj datoj iom dependas de diversaj horaroj kaj la deziroj de la partoprenontoj. Por trajnbileto de Moskvo ĝis Pekino kun halto en Krasnojarsk oni en Moskvo pagas 155 usonajn dolarojn.

Por la longa trajnvojaĝo oni planas multaj aktivaĵojn. Survoje de Moskvo al Krasnojarsk estas antaŭvidataj laborgrupoj pri ĵonglado (nu, ĉu vere eblas en trajno?), muzikado, eksterenrigardado (tio devus eble), kaj speciale atentinde: **Esperanto-kurso por komencantoj.**

En Krasnojarsk en Siberio la karavananoj povos partopreni la **Oriantan Someran Esperantan Junularan Tendaron, ORSEJT-on.** Por malpli ol 50 usonaj dolaroj vi ricevos manĝojn kaj tranoktadon.

Pluveturo el Krasnojarsk al Pekino la 20-an de julio. Post la alveno al Pekino la 23-an de julio eblas resti tie kelkajn tagojn por rigardi la urbon, aŭ tuj ekveturi al la UK. El Pekino al Koreio oni veturos unue trajne 10-15-horojn, poste per ŝipo. La prezo de la ŝipvojaĝo estas ĉirkaŭ 100 dolaroj.



Kontaktu **Jan van der Vliet** antaŭ la fino de januaro. Lia adreso estas: **Hebriden 8, NL-3524 Utrecht, Nederlando.** Tel. +31-30-896224 (hejme), +31-20-6821081 (laboreje), fakso +31-20-6826186.

TEJO estas via mondvasta tegmenta organizo por ĉiuj junaj esperantistoj. Ĝi havas 35 landajn kaj 2 fakajn sekciojn kaj 800 individuajn membrojn en la tuta mondo.

TEJO havas bonajn rilatojn kun la **ne**-esperantista mondo kaj estas ofte invitata al konferencoj kaj seminarioj de eŭropaj kaj mondaj instancoj (ekzemple Konsilio de Eŭropo, UNESKO) kaj de aliaj junularaj asocioj. Tre gravas por **TEJO** ke ni reprezentigĝas en tiaj kunvenoj: por esprimi nian opinion, por montri ke ni estis viva kaj vigla asocio, kaj por ekhavi valorajn kontaktojn kun homoj de aliaj organizoj.

Pro la konstanta kresko de niaj eksteraj rilatoj ni serĉas daŭre

reprezentantojn de **TEJO**.

Ili estu regulaj legantoj de *TEJO tutmonde* kaj povu prezenti la agadon de **TEJO** al la "krokodila mondo". Tial necesas bona kono de minimume unu plia monda lingvo krom Esperanto (prefere la angla aŭ la franca, sed utilas ankaŭ hispanaj aŭ germanaj lingvokonoj).

Ĉefa okupo de reprezentanto estas partopreni kunvenojn nome de **TEJO**. Tiaj kunvenoj okazas ĉie en la mondo, sed pleje en ĉiuj landoj de Eŭropo. La vojaĝkostojn pagos **TEJO**. La necesajn informojn kaj konkretajn instrukciojn vi ricevos de la gvidanto de KER (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de **TEJO**).

Ŝatantoj de kokteloj kaj ĉe-bufeda konversacioj, de flirtado kaj diskutoj, turnu sin al la KER-gvidanto:

Edlyn Teske
Albrechtstrasse 125
D-12165 Berlin
Germanio

retpoŝte: teske@math.tu-berlin.de

Pri spertoj de **TEJO**-reprezentantoj vi detale povas legi en *TEJO tutmonde*, numeroj 3/93 kaj 4/93, en la rubriko "eksteraj rilatoj".

Vage tra Sudameriko

Diversas la strategioj de la junulara movado, sed gravas ankaŭ ke oni aktivas pri la realigo de siaj alteflugaj planoj. Nian argentinan aŭtoron oni almenaŭ ne povas riproĉi pro senfara revado — fakte necesis mallongigi la raporton pri la informada vojaĝo tra Sudameriko, ĉar por mencii ĉion mankas loko. Legu kaj ekaktivu!

Plena je entuziasmo kaj vigleco, meze de junio, mi decidis komenci novan vojaĝon tra sudamerikaj landoj, celante diskonigon de Esperanto kaj ankaŭ plifirmigon tie, kie jam ardas niaj torĉoj.

Tarija, en Bolivio, estis mia unua provo vekti atenton pri Esperanto... sed kiel komenci? Kiun kontakti en nekonata medio? La respondoj venis tute neatendite. Kunvojaĝanto multe interesiĝis pri la signifo de mia verda stelo, kaj post nia babilado aperis perspektivo antaŭe eĉ ne supozita de mi. Li kontaktigis min kun la estro de la plukleriga fako de la loka universitato kaj kun anoj de la baha religio.

Oni aperigis sufiĉe vastan artikolon pri nia lingvo en la universitata revuo, kaj bahaanoj aliĝis al koresponda kurso de Argentina Esperanto-Asocio.

En Sucre ekestis forta intereso en la fakultato pri turismo, lingvoj kaj lingvistiko. Estis planita publika

prelego en universitata ejo, tamen en tiuj tagoj la lando estis skuata de protestoj flanke de profesoroj kaj studentoj, kaŭze de kio oni fermis ĉiujn universitatajn ejojn... kaj tiel la prelego fiaskis.

*Koĉabambo tendumas
januare*

Koĉabambo estis ja inter miaj planitaj haltoj en Bolivio. Tie atendis min la membroj de la pasintjare fondita Koĉabamba Esperanto-Asocio, kies nova adreso cetero estas **Casilla 2550, Cochabamba, Bolivio**. La ĵurnalo *Opinión*, redaktata en Koĉabambo, tamen distribuata naciskale, akceptis aperigi artikolon pri Esperanto, kaj tiel diskonigis multon pri la agado de KEA. La estro de la lingvistika fako de la Nacia universitato San Simón mal-



fermis al mi la vojon al universitata publiko, permesante prelegon tie.

Post Bolivio, mia sekva vojaĝcelo estis São Paulo en Brazilo. Tie mi ĉeestis la 29an Brazilan Esperanto-Kongreson. Dum la kongreso reprezentantoj de landaj asocioj el Brazilo, Urugvajo kaj Argentino kunvenis por esplori eblojn por kunlaboro inter niaj landoj.

Tiam mi informis pri la 2a Sudamerika Tendumado en Esperanto, komuna aranĝo de Argentina Esperantista Junulara Organizo (ArgentEJO), Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) kaj la bolivia grupo. La tendumo okazos en Koĉabamba komence de januaro 1994, kaj fakte ne en tendoj. De mia vidpunkto, ĉi tiu okazaĵo estas grava en la evoluo de la

kunlaboraj rilatoj inter landaj sekcioj de TEJO kaj landaj asocioj en Sudameriko. Por reprezentantoj de landaj asocioj en Sudameriko estas planata kunveno en Bonaero dum la pasko de 1994.

homeopatiistoj esperantistiĝis


Post tiu kongreso mi vojaĝis al Ribeirão Preto, malgranda industria urbo 300 km okcidente de São Paulo. Tie okazis la Unua Semajno Esperantista de Ribeirão Preto, dum kiu mi gvidis internacian bazan kurson por komencantoj.

Tuj poste devis komenciĝi la 49a Tutamerika Kongreso de Homeopatio. Semajnfine jam alvenis kongresantoj, kiuj multe interesiĝis pri Esperanto, kaj tiel mi akceptis resti plian semajnon por gvidi alian kurson por tia faka publiko.

En la kongresejo staris budo de Brazila Esperanto-Ligo, kaj eĉ en ĉiu kongresa teko troviĝis dokumentoj en kaj pri Esperanto — interesaj diskonigiloj en neesperanta aranĝo. Speciale plaĉis al mi la homeopatia terminaro trilingva: esperanta-portugala-hispana.

Du laborigaj monatoj plenaj je diversflankaj spertoj jam pasis. Nun atendas la sekvoj:

gravas la naskiĝanta kunaĝado de



niaj landaj organizaĵoj, kiuj nun serĉas iom pli strukturan kontakton, kaj la senpaŭza

konigo de Esperanto en niaj landoj.

Por konstante antaŭenigi nian laboron por diskonigi Esperanton en Sudameriko ni ja bezonas la malavaran helpon de nia tutmonda Esperanto-komunumo. Pere de la fondaĵo Ameriko de UEA vi povas helpi en la realigo de diversaj projektoj en nia kontinento.

Atilio Orellana Rojas
Argentino

Eĉ en Usono estas junularo!

Ne timu — USEJ plu ekzistas. Fakte ankaŭ en la norda parto de la amerika kontinento troviĝas junaj esperantistoj. La plejparto estas ĝis nun izolitaj, ĉar amasa movado ne ekzistas. Tamen denove aperadas la bulteno de USEJ, kaj aliaj aktivaj planatas.

En la pasintaj numeroj aperis tiel multe da novaĵoj pri la brazila movado, ke eble ŝajnis al kelkaj, ke la usona junularo mortis (...denove). Bonŝance, tio tamen ne okazis. Depost la unua pasintjara numero de TT, kie oni pasintfoje

neesperanta lingva rubriko

Sufiĉe multaj el niaj membroj laŭ mia scio estas lingvaj fervoruloj — ili amas lerni ligvojn. Do, mi intencas en la venontaj numeroj de *Ktp!* en-

konduki lingvan angulon, kie niaj legantoj povas lerni kiel diri kaj skribi bazajn frazojn, diraĵojn kaj slangajojn en diversaj lingvoj.

Mi ne celas pere de ĉi tiu rubriko doni turisman vortareton, sed simple gustumon de la beleco, riĉeco kaj unikeco de aliaj lingvoj. Kvankam mi bonvenigas kontribuaĵojn pri ĉiu lingvo, mi speciale invitas la parolantojn de malpli konataj lingvoj (kiel la kataluna, okcitana, eŭska ktp.) partopreni.



ciis nin, aperis kelkaj novaĵoj.

La estraro de USEJ decidis ŝanĝi la nomon de la asocio al Usona Esperantista Junularo. La nova nomo tamen ne signifas novan adreson. La adreso de nia centra oficejo daŭre restas la sama: **USEJ, 624 Second Street, Lancaster PA 17603-51144, Usono.**

Ankaŭ finfine disendiĝis novembre la unua numero de nia bulteno *Ktp!*. Tiuj kiuj volus aboni ĝin senpage, skribu al la supra adreso. Ni tre ŝatus interŝanĝi bultenojn kun aliaj junularaj organizoj.

Interesitoj traduku la jenajn frazojn kaj skribu interkrampe la ĝustan prononcon, uzante la esperantan ortografion kaj substrekante la akcentitan silabon. Bedaŭrinde, ĉar mia komputilo ne kapablas tajpi ion ajn krom latinaj literoj, tiuj kiuj kontribuas pri lingvoj uzantaj aliajn skribmanierojn devas transliteri la frazojn.

Jen la frazoj: **a.** Saluton! **b.** Bonan tagon! **c.** Kiel vi fartas? **ĉ.** Mi fartas bone/malbone/sufiĉe bone **d.** Mia nomo estas... **e.** Ĉu vi parolas Esperanton? **f.** Dankon. **g.-h.** Du-tri ĉiutagaj frazoj, ekzemple en kelkaj lingvoj estas amika formo de "Kiel vi fartas?"

Antaŭdankon pro viaj kontribuajoj!

perpoŝta biblioteko planata

Venontjare USEJ intencas malfermi perpoŝtan bibliotekon por helpi siajn membroj, kiuj plejparte estas izolitaj. Jam komenciĝis la kolektado. Dum la pasinta jaro mi kolektis diversajn gazetojn kaj diversajn esperantaĵojn. Ĝis nun ni havas centon da gazetoj kaj revuoj eldo-

nitaj en 27 landoj, kaj etan stokon da aliaj esperantaĵoj, inkluzive kelkajn kongreslibrojn kaj afiŝojn. Kelkaj bonkoraj samideanoj el Usono, Belgio kaj Nederlando jam kontribuis multe. Ni bonvenigas ĉion, kio temas pri Esperanto, eĉ simplajn broŝurojn aŭ flugfoliojn. Mi antaŭdankas denove pri via helpo!

Pri la ĉi-jara agado ni jam planis sufiĉe multe, sed pri tio vi certe povos legi en la venontaj numeroj de TT. Do, jen nia movado! Mi esperas, ke tio sufiĉas por montri, ke ne nur Brazilo havas junularon!

Jozef Truong
Direktoro de USEJ

Esperantaj elsendoj de tri kontinentoj

Pola radio: Ĉiutage. 14.30–14.55 al Eŭropo laŭ la frekvencoj 6135 kHz, 7145 kHz, 9525 kHz, 9540 kHz, 11815 kHz; 21.30–21.55 al Eŭropo laŭ la frekvencoj 1503 kHz, 5995 kHz, 6135 kHz.

Ĉina radio: Ĉiutage. 11.00–11.25 al orienta Azio laŭ la frekvencoj 6955 kHz, 9480 kHz; 13.00–13.25 al suda Azio laŭ la frekvencoj 11650 kHz, 11840 kHz; 20.00–20.25 al Eŭropo laŭ la frekvencoj 7405 kHz, 7470 kHz, 9965 kHz; 22.30–22.55 al suda Ameriko laŭ la frekvencoj 9480 kHz, 11515 kHz.

Radio Havano: Dimanĉe. 07.00–07.30 al norda Ameriko kaj Pacifiko laŭ la frekvenco 6060; 15.00–15.30 al Ameriko kaj Karibio laŭ la frekvenco 11760 kHz; 18.30–19.00 al Afriko kaj Mediteraneo laŭ la frekvenco 17760 kHz; 22.00–22.30 al Eŭropo kaj Mediteraneo laŭ la frekvenco 17760 kHz; 23.30–24.00 al Ameriko laŭ la frekvencoj 11760 kHz, 11970 kHz, 13660 kHz.

Pli demokratiaj principoj

La Komitato de TEJO kompetentas pri strategiaj decidoj kiuj rilatas al la agado de TEJO. Ĝi kunvenas ĉiujare dum la IJK por tion diskuti. Kiom demokratiaj estas do ĝiaj decidoj? Espereble de nun eĉ iom pli ol antaŭe, ĉar oni forigis la eblecon de senantaŭanonca poŝtvoĉdonado. Cetere, ĉu vi kandidatiĝis?

Antaŭ kelkaj semajnoj ĉiuj membroj de TEJO ricevis poŝtkartajn avizon pri la elekto de komitatanoj B por la venonta jaro, kaj inviton sin kandidatiĝi. La komitatanoj B estas la reprezentantoj de la individuaj membroj en la Komitato de TEJO. Kune kun la komitatanoj A (kiuj reprezentas la Landajn Asociojn), la komitatanoj C (kiuj elektiĝas pro faka kono) kaj la estraranoj, ili respondecas pri la strategiaj demandoj rilate al la agado de TEJO.

kion faras la komitato?

En ĉirkaŭ dek horoj da kunsido dum ĉiu IJK, la Komitato traktas ekzemple la jarraporton de la Estraro, financon, politikon pri gazetoj kaj aliaj eldonaĵoj, planojn por estontaj kongresoj, ktp, ktp. Ĝenerale la Estraro agas laŭ siaj propraj vidpunktoj, kaj memstare decidas pri la "ĉiutagaj" aferetoj kiuj postulas ĝian atenton. La Komitato esprimas sian (mal)kontenton pri intaj kaj ontaj agadoj, kaj donas ĝeneralajn gvidliniojn por la

estrara laboro.

La proceduroj, laŭ kiuj la Komitato laboras, estas fiksitaj en aparta Regularo. Ĝi devas garantii ke ekzistas demokratia bazo por la decidoj de la Komitato.

Unu el la plej gravaj kondiĉoj en tio estas ke komitatanoj povas informiĝi pri ĉiuj decidendaj temoj, kaj diskuti pri ili kun aliaj komitatanoj. Kutime la informojn ili ricevas dum la jaro en TEJO tutmonde kaj en la jarraportoj. Diskutoj okazas ĉefe dum la IJK, en kaj ekster (!) la kunsidoj.

poŝtvoĉdono — por ruza estraro?

Alia postulo de la Regularo zorgas ke ĉeestu minimuma nombro da komitatanoj (kvorumo) en la kunsidoj por povi valide decidi. Se ne estas tia kvorumo, la Komitato povas tamen diskuti kaj provizore voĉdoni, sed la decidoj bezonas postan konfirmon per poŝta voĉdonado. Ankaŭ tion reguligas la Regularo.



Tia poŝta voĉdonado pasinte ankaŭ uziĝis por decidi pri aferoj pri kiuj la Komitato antaŭe ankoraŭ tute ne okupiĝis! Tio signifis ke la sekretario dissendis novajn proponojn al ĉiuj komitatanoj, por ricevi la voĉdonojn, sen ke la komitatanoj povis ricevi bonajn informojn pri la fono de tiaj proponoj aŭ diskuti pri ili. Oni povas imagi ke tiel (malbonvola) estraro povus akceptigi malfacilan proponon eksterkunsido, se ĝi atendus problemojn dum enkunsida pri-trakto.

nun pli demokratie — kaj eĉ laŭleĝe

Por eviti tiajn maldemokratiajn praktikojn, estas pli bone ne uzi la poŝtan voĉdonon tiel. Eĉ pli rigore: la nederlanda juro, laŭ kiu funkcias TEJO, tute ne permesas tian voĉdonadon. Ĝi plene fontis el misinterpreto de (origine) la Komitata

Regularo de UEA, ĉe kiu same aperas. Pro tio la Estraro decidis ne plu uzi la poŝtan voĉdonon sen antaŭaj diskutoj en la Komitatkunsidoj.

Esperable tiu ĉi iom teknika priskribo ne heziligas vin pri via sinanonco kiel kandidato por iĝi komitatano B. Estas nur kelkaj fakuloj kiuj okupiĝas pri tiaj detaloj, kaj kutime oni ne devas tro multe preparoli tiajn dum la kunsidoj. Nur ĉar tio ĉi vere tuŝas la funkciadon de a Komitato, kaj ĉar eble interesas al la membroj scii kiom demokratia estas ilia organizaĵo, ni opiniis tiun ĉi informon necesa. Esperable vi estas konvinkita ke TEJO funkcias tute demokratie ...

Ĝis revido en kunsido!

Danny ten Haaf
Vicprezidanto kaj
Estrarano pri Financo
de TEJO

La dek landoj kun plej da IM de TEJO:

	<u>Kvanto</u> <u>de IM</u>	<u>IM</u> <u>en %</u>	<u>komitat-</u> <u>anoj</u>	<u>k-anoj</u> <u>en%</u>
1. Germanio	86	12%	8	16%
2. Brazilo	40	6%	1	2%
3. Francio	38	5%	2	4%
4. Usono	35	5%	2	4%
5. Hispanio	34	5%	1	2%
6. Kanado	32	5%	2	4%
7. Nederlando	28	4%	4	8%
8. Pollando	23	3%	0	0%
9. Rusio	22	3%	2	4%
10. Togolando	21	3%	0	0%
10. Italio	21	3%	2	4%

Profunde internacia skoltado

En oktobro 1993 pasis 75 jaroj de kiam Alexander William Thompson verkis la libreton *Propono pri Skolta Esperantista Ligo*. Tiel naskiĝis la organizo, de 1972 nomata *Skolta Esperanto-Ligo*.

La unuaj jaroj estis sukcesaj kun internaciaj SEL-tendaroj, kaj pinte en 1933 partopreno en la Monda skolta ĵamboreo en Hungario kun granda grupo de esperante parolantaj skoltoj.

La kondiĉoj tamen ne estis favoraj por SEL. La Monda skolta organizo praktike malpermesis la uzadon de Esperanto en

1934. Ĉar "Esperanto ne havas praktikan valoron", la organizo decidis ne rekomendi la lingvon al siaj membroj-organizoj. Tiun rezolucion oni nuligis en 1964, kaj nuntempe la sinteno de la monda skolta oficejo certe ne estas malaproba, sed la kontaktoj estas malmultaj, ĉefe pro la malforteco de Skolta Esperanto-Ligo.

krizo krizis ankaŭ en SEL

Dum kelkaj jaroj estis granda krizo en SEL. Gravaj funkciuloj, kiuj dumlonge laboris, devis ekŝiĝi. Estis problemoj trovi novajn fortojn. Tiu krizo estis jam plejparte venkita, kiam mi komencis redakti la organon de la ligo *La Skolta Mondo* fine de 1992, eĉ se daŭre ni serĉas novan ĝeneralan sekretarion kaj pliajn novajn aktivulojn.

Jam okazis plurnaciaj SEL-tendaroj Skolto -91, -92 kaj -93. Okazis ankaŭ aliaj SEL-aranĝoj en diversaj landoj, kaj ŝajnas ke la evoluo nun ne stagnas. Estas planoj ankaŭ por 1994. Kiel redaktoro mi povas ĝoji pri raportoj de lokaj SEL-grupoj el la tuta mondo. Okazas kursoj laŭ la skolta lernolibro *Ĵamborea lingvo*, kiu baldaŭ aperos en renovigita eldono. SEL planas aktive partopreni la grandajn skoltajn tendarojn en Nederlando 1994 kaj 1995,



la Eŭropan kaj Mondan Ĵamboreojn.

internacian dimension al skoltado

Por mi, antaŭe tre aktiva skolto, poste tre aktiva esperantisto, la SEL-tendaroj estis mirindaj travivaĵoj. Esperanton ni ne uzis nur ĝenerale por uzi Esperanton, por umi kune ĝenerale. Esperanton ni uzis pro nia komuna intereso, pro skolteco, kaj niaj aktivaĵoj estis tradicie skoltaj. Esperanto estis por ni bongustiga spico, kiu donis profundan internacian etoson. Certe ne nur SEL, sed ankaŭ multaj aliaj fakaj organizoj povas atingi la samon. Esperanto atingas tiamaniere homojn, kiuj ne interesiĝus nur pri la ĝenerala Esperanto-movado, ĉar Esperanto ĉi tie donas plian, internacian dimension al la

jam kutima agado.

Aperos speciala jubilea numero de La Skolta Mondo. Ĝin vi povas ricevi kontraŭ du internaciaj respondkuponoj, mondonaco al la uea-konto selx-m, aŭ eĉ senpage, skribante al la redaktoro: **Anna Margareta Ritamäki, Peltolavägen 6 B 36, FIN-20720 ÅBO, Finnlando.** En la numero aperas informoj pri la historio de SEL, sed ankaŭ pri la nuna agado. Membroj de SEL ricevas la gazeton kvarfoje jare. De la ĉi-supra adreso vi povas peti ankaŭ pliajn informojn pri SEL kaj pri la eblecoj membriĝi.


Anna Margareta Ritamäki

Ĉu vin interesas narkotaĵoj?

Tiukaze vi partoprenu la 18an Internacian Junularan festivalon, kiun aranĝas Itala Esperantista Junularo de la 30a de marto ĝis la 5a de aprilo en la montara restadejo de Pracatinat (7 km de Fenestrelle, la provinco de Torino, Italio). La temo de la festivalo estas **Narkotaĵoj en la 90aj jaroj.**

Se narkotaĵo estas tio, kio sklavigas la homon, igas lin dependa kaj nuligas lian volon, do nia socio estas narkota — ĉar tion faras komerca reklamo, politiko, religio, eĉ sporto.

Se interesas vin diskuto pri tiaj temoj, aliĝu al la 18a IJF! Aliĝilon petu de **Itala Esperantista Junularo, Guido Carravieri, Via Porpora 140, I-20131, Italio.**



Bonvenon al Retlando!

Se vi ankoraŭ ne scias por kio utilas komputilaj retoj, legu tion ĉi-sube. Fakte pere de komputilaj ligoj oni povus multe rapidigi kaj faciligi la komunikadon inter esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj spite al grandaj geografiaj distancoj. Cetere indas noti, ke ekde nun ankoraŭ la redakcio de TT estas atingebla retpoŝte. Sendu viajn kontribuojn kaj reagojn al la retadreso sur p. 2!

Komputiloj pli kaj pli penetras en la ĉiutagan vivon. Tiuj komputiloj ofte estas ligitaj per retoj, kio ebligas rapidan kaj facilan komunikadon kaj interŝanĝadon de informoj. Ekde la momento de la ekesto de tiaj retoj, ankoraŭ esperantistoj aktivigas en ili.

Komunikado per komputilaj retoj havas plurajn avantaĝojn; pri kelkaj ĉi-sube, la aliajn vi mem eltrovu!

rapida komunikado

Per komputilretaj mesaĝoj ("retpoŝto" aŭ "elektronika poŝto") eblas vere rapida komunikado, komparebla kun telekopio. Mesaĝoj kutime alvenas ene de unu tago, ankoraŭ al la alia flanko de la mondo.

Vi povas sendi mesaĝon al unu persono, kiel vi kutimas per papera poŝto aŭ per telekopio, sed ankoraŭ eblas sendi unu mesaĝon al pluraj personoj, ekzemple laborgrupo aŭ komisiono en kiu vi membras. Ekzistas adresaro, kiu nun enhavas retadresojn de pli ol 350 esperantistoj el 36 landoj, monate aktualigata kaj facile akirebla. Precipe valora estas la fakto ke enestas multaj personoj ekster Usono kaj Eŭropo, ekzemple el Kubo aŭ Rusio, kiujn oni apenaŭ sukcesus kontakti sen retpoŝto. Kaj ankoraŭ organizoj kiel UEA kaj ELNA atingeblas rete.

Ekzistas adresaro, kiu nun enhavas retadresojn de pli ol 350 esperantistoj el

36 landoj, monate aktualigata

- kaj facile akirebla. Precipe
- valora estas la fakto ke enestas multaj

personoj ekster Usono

kaj Eŭropo, ekzemple el Kubo aŭ Rusio, kiujn oni apenaŭ sukcesus kontakti sen retpoŝto. Kaj ankoraŭ organizoj kiel UEA kaj ELNA atingeblas rete.

La ekzisto de Esperantoforumoj en la diversaj retoj,



kiuj estas interligitaj, ebligas interŝanĝi informojn kaj ideojn kun pli-malpli ĉiuj elektronike atingeblaj esperantistoj samtempe! En kelkaj retoj eĉ eblas rekta babilado kun unu aŭ pluraj personoj: ĉion, kion vi tajpas, tuj vidas la alia(j) persono(j). Jen vere internacia Esperantujo.

informaj arkivejoj

En pluraj retoj ekzistas centraj arkivejoj kie haveblas programoj, informoj, tekstoj ktp. Tie vi povas ekzemple preni la lastajn esperantajn Windows- kaj DOS-ilojn, foliumi tra referencaro da Esperanto-artikoloj, legi artikolojn el Monato aŭ statistike analizi elektronikan version de la Biblio, preni vortaron aŭ liston de ĉiuj kapvortoj de PIV ktp. ktp. En la arkivejoj kolektiĝas ĉio kion homoj pretas senpage disponigi al aliaj.

lernu Esperanton per la reto!

Sed uzado de la reto ne nur havas internajn avantaĝojn. Ankaŭ eblas montri al la ekstera publiko ke Esperanto vivas, utilas, uzatas tutmonde. Simpla ĉeesto, kaj bone argumentitaj respondoj al starigitaj demandoj bone efikas kaj vekas intereson.

Per la afabla helpo de ELNA, KEA kaj GEJ nun ekzistas tri elektronikaj enkondukaj korespondaj kursoj pri Esperanto en la retoj (en la angla, franca kaj germana), kiuj vere furoras. Entute aliĝis en du kaj duona jaroj pli ol 1.000 lernantoj, kaj helpas en la korektado ĉirkaŭ 40 korek-

tantoj. Finstudentoj ricevas elektronikan atestilon kaj ofte daŭrigas per elektronika versio de la Gerda-kurso de Claude Piron, kiu afable permesis uzadon de la materialo. Jam la unuaj finstudentoj mem fariĝis korektantoj kaj ekaktivis...-

Krom la kursoj por interesitoj ekzistas servoj speciale por esperantistoj. Ilin volontule ebligas kelkaj entuziasmaj retuloj. Mi nomu la Korespondan Servon, kiu provas ligi personojn kiuj serĉas (elektronikan) korespondemulon. Ankaŭ la Lingva Servo, kiu gramatike korektas malgrandajn tekstojn, ludas gravan rolon en la uzado de Esperanto en la retoj.

ne nur junulara, sed strategia

Multaj kredas ke komputiloj estas por la junularo. Fakto estas ke tiu ĉi artikolo aperas en junulara gazeto. Fakto estas ke en la retoj svarmas junaj studentoj kaj hobiistoj. Sed tio nepre ne signifas ke aliaj rezignu! Multaj retuloj jam festis la tri-dekan naskiĝtagon, kaj aktive partoprenas en la evoluigo de la retaj Esperanto-aktivecoj.

Feliĉe ekzemple UEA kaj ELNA per siaj retadresoĵ jam montras ke gravas atenti elektronikan komunikadon en la komputilaj jardekoj. Mi firme kredas ke, se ĉiuj landaj asocioj de UEA kaj TEJO estus atingeblaj rete (eĉ se nur per loka peranto) tio grave faciligus kaj rapidigus la internacian komunikadon de UEA kaj TEJO. Jam 36 junularaj landaj asocioj atingeblas rete! Gravus nun ke UEA ekhavu pli modernan kaj facile uzeblan retadreson.

kiel ricevi aliron?

Se vi laboras per komputilo en universitato aŭ en granda firmao, povas esti ke vi jam povas uzi komputilajn retojn, plej ofte la unu el la retoj *Internet*, *Usenet*, *Decnet* aŭ *Bitnet*. Se vi hejme havas komputilon kaj modemon, vi povas tra loka buldenejo (BBS) kontraŭ malaltaj kostoj konekti al *Fidonet*, aŭ kontraŭ plej ofte iom pli altaj kostoj konekti al servo kiu ebligas al vi uzadon de la aliaj retoj (ekzemple *CompuServe*). Se vi ŝatus havi pli da informoj, kontaktu fakdelegiton pri komputilaj retoj, prefere en via lando, ĉar la konekteblecoj (kaj la kostoj) ofte varias laŭlande.

kiom kostas?

Por doni ideon mi listigu kelkajn ekzemplojn. Konekto tra universitato kie vi studas aŭ la firmao kie vi laboras ofte estas senpaga. La firmao "aĉetis" ligan, kaj pro via mesaĝo ne pagas pli.

Per propraj komputilo kaj modemo la eblecoj varias. Konekto al *Fidonet* plejofte ankaŭ estas senpaga, kvankam aldoniĝos iom da viaj lokaj telefonkostoj. Kelkfoje sistemestroj en *Fidonet* petas malgrandan kontribuon en la enlandaj aŭ internaciaj telefonkostoj kiujn ili havas pro vi, ekzemple 5 NLG monate. En Nederlando eblas por 20 NLG monate (kun viaj aldonaj landaj telefonkostoj) havi konekton tra *CompuServe*, kaj por 25 NLG monate havi *Internet*-konekton, ankaŭ kun aldonaj landaj telefonkostoj.

Tiun ĉi artikolon mi tajpis per mia propra komputilo en Nederlando, kaj sendis per elektronika poŝto rekte al via redaktoro en Svedio, ene de kelkaj minutoj. Li ne bezonos resendi disketon, li ne bezonos retajpi la tekston, kaj espereble ne bezonos multon ŝanĝi...

Derk Ederveen

retpoŝte atingebla ĉe:

Fidonet: 2:283/323.7

Internet: derk@saluton.hacktic.nl

Milmetra Internacia Renkontiĝo (MIR) en Kroatio

Esperantistoj en Kroatio organizas de la 3a ĝis la 6a de marto 1994 renkontiĝon pri la temo *Novkonservatismo*. Sub tiu titolo oni esploros diversajn temerojn, ekzemple spiritan renoviĝon kaj la kreskantan interesiĝon pri religio, ŝanĝojn en sociaj, laboraj kaj aliaj rilatoj inter la seksoj. Se vi volus gvidi laborgrupon, diskuton aŭ ludon, sendu vian proponon. Same faru se vi volus kontribui al la distra programo.

La evento espereble okazos en la milmetr-alta montaro (aŭ montetareto!) apud Zagrebo. La kotizo estas 50 germanaj markoj, sed la 1-an de februaro altiĝos al 60 markoj. Aliĝu frue kaj ŝparu vian monon! Por mendi aliĝilon, informiĝi, aŭ proponi programeron, skribu al: **Rick Newsum, Baštijanova 30, 41000 Zagreb, Kroatio.**

Printempu samideane

Jen informoj pri kelkaj junularaj aranĝoj, kiuj estas planataj por la unua parto de la jaro 1994. Se vi volas, ke aperu informoj pri via aranĝo en TT, vi ĝustatempe sendu viajn informilojn kaj aliĝilojn al la redakcio. La adreson vi trovos sur paĝo 2.

januaro

27.-30.1. Skiado de Ĉeĥa Esperanto-Junularo en Horni Polubni. Jilská 10, CEK-110 01 Praha 11, Ĉeĥio. Tel. +42-2-220262.

30.1.-12.2. Infana feriado (por 11-16-jaruloj) en Poprad (Slovakio). Aranĝas Esperanto-Junularo Brandenburg-Berlin, Berliner Str. 49, DE-14467 Potsdam, Germanio. Tel. kaj fakso: +49-331-24003.

februaro

19.-20.2. Skiado de Junularo Esperantista Svislanda en Meiringen. Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Tel. kaj fakso: +41-39-267407.

27.2.-6.3. 5a Esperanta Ĥor-Staĝo en La Frechede - Montferrier, Francio. Informas Jorgos, F-09 120 St Felix, Francio. Tel. +33-61-608683.

marto

3.-6.3. Milmetra Internacia Renkontiĝo (MIR) en Kroatio pri la temo *Novkonservatismo*. Rick Newsum, Baštijanova 30, 41000 Zagreb, Kroatio. (Rig. paĝon 25.)

25.-27.3. Esperanto-Junularo Bonn, kuirseminario (limigita kapacito). Rheinweg 15, DE-53113 Bonn, Germanio. Tel. +49-228-235898, fakso +49-228-232764.

30.3.-5.4. Internacia Junulara Festivalo de Itala Esperanto-Junularo en Pracatinat (Torino). Pli da informoj sur paĝo 22.

aprilo

1.-5.4. Paska renkontiĝo de Nederlanda Esperanto-Junularo en Lemele en la provinco Overijssel. Klas Dijkstra, Jan Luijkenlaan 102, NL-7412 NS Deventer, Nederlando.

Paske: Paska renkontiĝo de Ĉeĥa Esperanto-Junularo. Adreso sub januaro.

majo-junio

1.-8.5. TEJO/KER-seminario pri la eŭropa kontribuo en la hodiaŭa mondo. Aliĝilo aldonita al ĉi tiu numero de TT.

27.6.-15.7. 25a Somera Esperanto-Kursaro en la Ŝtata Universitato San Francisco. ELNA, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, Usono. Tel +0-510-6530998.

Ne ofendu la putinojn!

Multaj leteris pri putinoj kaj gejoj. Feliĉe neniu reaginto rekte aprobas la eksigon de membro pro samseksemo. Pluraj reagis por defendi la putinojn, kaj oni povas ja konsenti, ke ili apenaŭ estas malpli respektidaj ol iliaj klientoj. Tamen tio estas jam iom alia diskuto. Ja ŝajne ĝis nun neniun putinon oni eksigis el INOE.

Pri la agado de la INOE-estraro, pri kiu vi raportis, mi ege ĉagrenas (bedaŭrinde vi ne skribis la adreson de tiu asocio, tial mi ne povis skribi rekte al ili).

Mi antaŭe ne estus kredinta, ke tiom da maltoleremo kaj stulteco estus ebla inter esperantistoj.

La seksumado de la membroj ne estas afero, pri kiu iu estraro rajtus decidi, sed tutprivata afero. Kaj oni ne rajtas forigi membrojn el asocio, nur ĉar ili preferas unu formon de seksumado. Hodiaŭ oni forigas la samseksemulojn kaj amoristinojn (cetere, ĉu oni ankaŭ forigu la homojn, kiuj uzas la servojn de amoristinoj, la estraro de INOE ne diris), morgaŭ oni forigos anojn de kelkaj religioj, kaj postmorgaŭ...

Mi petas vin, rigardi plu la okazaĵojn, kaj se oni al Xesús ne ebligas revenon en

la asocion, mi vin petas postuli — ankaŭ en mia nomo — ĉe UEA, ke oni forigu INOE-n el la aro de UEA-rilataj asocioj, ĉar la agado de INOE estas kontraŭ la idealoj kaj la honoro de Esperanto.

Tobias Meissner

Germanio

*el letero al la sekraterio de
INOE*



...Mi povas certigi al vi ke en nia lando la lokaj naturistaj kluboj ne malakceptas samseksemulojn. Cetere estas malaprobendege, ke vi komparas samseksemulojn kun prostituitinoj. Mi ege dubas, ĉu la statuto de INOE permesas eksigi membrojn surbaze de ilia samseksemo. En la dokumentoj, kiujn mi ricevis post mia aliĝo al INOE, mi ne povas trovi iun ajn koncernan skribaĵon. Kontraŭe... estas menciite

interalie: "Membreco: Regula membro povas fariĝi ĉiu esperantlingva naturist(in)o".

Tio do signifas, ke la INOE-membreco estas ebla... senkonsidere politikan, etnan, religian, seksan aŭ kiun ajn vivkoncepton. Kaj tio estas tute prava. *Kaj esperantistoj kaj naturistoj ja abomenas ian ajn diskriminacion!*

Hans ten Hagen
Nederlando

ne ofendu putinojn!

Ne estinte membro de naturismaj movado aŭ klubo kaj do ankaŭ ne de INOE, mi ĉiam tre ŝatis, ekzemple, naĝi nuda, kvankam verdire mi neniam sentis min tre sportema nek eŭgenike modela kaj imitinda. La skandala decido de INOE eksigi sian membron Xesús Muñños pravas, ke INOE estas organizo diskriminacia, reakcia kaj inkvizicia, kaj tial mi opinias bona, ke TEJO faru premon al INOE laŭeble ankaŭ pere de UEA.

Mi tamen deziras protesti kontraŭ la starpunkto de TEJO defendi nur gejojn. La vortoj de la eksiga letero de Ferdinand Simon grave ofendas ankaŭ prostitutinojn, kaj estas bedaŭrinde, ke la prezidanto de TEJO ne esprimis sian konsternon pri tiel kruda atako kontraŭ la putina gildo.

La prostitua metio, same ĉe putoj kiel ĉe putinoj, ofte ŝuldiĝas al socia mendo kaj al nepovo elekti metion malpli elĉerpan, kiel pravas la nuna putiniĝo de multaj virinoj en pluraj landoj de orien-

ta Eŭropo kaj Azio. Krome, en la kazo, ke temas pri altklasa kaj malĉipa volonta putineco, ĝi estas profesio same digna, se ne pli, ol tiu de militisto, politikisto aŭ financisto, eĉ se tion ne volas konfesi nia socio samtempe hipokrita kaj cinika.

Georgo Kamaĉo
Hispanio

nelaŭmoda komento

Eble konsentas sufiĉe multaj legantoj, ke dum geaj konatiĝoj la seksan intimiĝon plej ofte bremsas, prudente kaj feliĉe, la virino. (Ŝia risko estas ja diversflanke pli granda.)

Atendeblas do, ke kelkfoje seksumado inter viroj, en taŭga etoso, malmulte bremsiĝas. Taŭgan etoson en Budapeŝto donas la saŭnoj de kelkaj publikaj banejoj. Krome okazas foje (ankaŭ al mi) ke gejoj iom tro persvademe proponas intimiĝon al negejoj.

Homaj deziroj, plie ĉe infanoj, estas sufiĉe plastaj kaj muldeblaj, kaj vole-nevole, plej multaj homoj ne taksas samsek saman bona modelo. Fakte mi povas kompreni kial ĝuste nudistoj timas (se temus pri kolektantoj de poŝtmarkoj la problemo ja apenaŭ leviĝus).

Kaj tamen la plej multaj homoj ĝenerale sufiĉe prudente agas, kaj ŝajnas iom maljuste kaj malkutime jam "anticipe" eksigi iun.

Mike Sadler
Britio/Hungario

Dekomence diferencigi

Plu daŭras la diskuto pri sangosoifa naciismo. Tamen feliĉe ŝajnas, ke post la kongreso en Vraca la tono iĝis iom pli nuanca. Nia kataluna aŭtoro memorigas, ke Kataluna Esperanto-Junularo neniam havis la celon batali por la sendependeco de Katalunio.

La artikolo de Norberto Saletti en TT 4/93 estas interesa, ĉefe ĉar ĝi remalfermas gravajn demandojn, kiuj prezentiĝas eternaj. Tamen, en ĝi evidentas la kerno de la problemo de TEJO rilate naciojn: la konfuza sinteno rilate ŝtaton kaj nacion.

KEJ ne celas sendependecon

Dum la lasta komitatkunsido en Vraca, Danny ten Haaf parolis pri "la rekono de kataluna ŝtato". Tio, kio povus unuavice ŝajni anekdota, estas sufiĉe simptoma por la ĝenerala miskompreno inter TEJO kaj la katalunoj. Neniam — absolute neniam — katalunoj petis de UEA aŭ TEJO apogon por la sendependiĝo de Katalunio, do ĝia ŝtatiĝo. En Kataluna Esperanto-Junularo estas ĉiaj homoj, kaj la sendependeco de Katalunio ne estas ĝia celo.

La celo de KEJ estas memstare kaj tran-

kvile labori por kaj per Esperanto, en la leĝa kataluna teritorio kaj la baleara insularo. La tasko de KEJ estas kaj devas esti la tasko de kiu ajn alia landa sekcio, sen pli da pledoj aŭ postuloj.

Aferoj kiel tiu pri Pasporta Servo bone spegulas la malfidon de la nuna estraro ne nur rilate katalunoj sed rilate la ceterajn naciojn sen ŝtato. Jam delonge, Katalunio ĝuas propran registaron, respondecantan pri la plimulto de la ĉiutagaj zorgoj. En sia ekstera politiko, la kataluna registaro uzadas en la komerca, turisma aŭ kultura reklamado nur mapojn de kaj menciojn pri Katalunio, neniel menciante (ĉar nenecesas), ke temas pri aŭtonoma komunumo en la hispana ŝtato. Kial do TEJO timu la "sangosoifan naciismon", kiam ni plene enkadriĝas leĝe kaj laŭsisteme?



nacio ne estas ŝtato

La problemo estas, ke se ni pensas pri ŝtatoj samkiel pri nacioj, tiam logike aperas skizofrenio. Ke Katalunio aŭ Flandrio havas landan sekcion de TEJO, neniel signifas, ke ili estas agnoskitaj kiel ŝtatoj (do, neniue leĝa problemo, neniue konscienc-riproĉo), ĉefe ĉar TEJO aŭ UEA — laŭ mia scio — ankoraŭ ne estas komisiitaj de la sekureckonsilio de la Unuiĝintaj Nacioj por decidi pri la idealaj landlimoj.

Se ni ĉiuj sukcesus kompreni, ke Francio ne estas nacio, sed ŝtato, kaj ke Okcitanio, Bretonio aŭ Alsaco estas nacioj ene de ŝtato, la aferoj multe pli bone marŝus. Kaj en tiu ĉi punkto, se ni ĉiuj estos civilizitaj, ne estos problemoj, neniue interpretos kiel insulton la diraĵon ke Skotlando estas nacio ene de la brita ŝtato, ĉu?

prijuĝi de kazo al kazo?

Tiel do, jes: TEJO devas tute same trakti Landajn Sekciojn sendepende de la ŝtato aŭ nacio, kiujn ili reprezentas. Kompreneble la ĉefa kialo por agnoski landan sekcion estas la eventuala movado ekzistanta malantaŭ ĝi. Tio signifas, ke ne sufiĉas, ke nacio ekzistas, sed ke ĝi havu objektive aktivan asocion.

Oni ne planu iun dekalogon por akcepto aŭ rifuzo de landaj sekcioj nur pro naciaj aŭ ŝtataj kialoj, ĉar ni ne normale kompetentas pri tio. Ni ja povas indvidue studi ĉiun kazon laŭ specialaj kaj propraj kondiĉoj, eĉ se tio ŝtelas al ni tempon kaj provokas kapdolorojn aŭ longajn diskutojn, interalie ĉar naciaj

problemoj ankaŭ povas aperi en tute agnoskitaj ŝtatoj. (Kio okazus, se rusoj kreus iun asocion en Estonio kaj petus agnoskon? Kio okazos en miksitaj regionoj kiel Transilvanio?)

Ĉiukaze mi ne vidas la problemon tiom enorma. Temas pri normala kaj sana debato, se ni daŭre ne perdus la paciencon. La plej granda harmonio estas la toleremo, la reciproka apogo kaj la ĉiufanka akcepto.

Arturo Romero
Katalunio

bunteco estas riĉeco!

Se TEJO havas la funkcion kontribui al nova, pli demokratia kaj paca percepto de la mondo flanke de la junularo, ĝi ne povas kontraŭi la rajton je sindeterminado de la popoloj, kiu estu kolono de nova, pli justa, monda ordo. La ideo havi tre buntan Pasporta Servo -kajeron, kie la popolaj (ne ŝtataj, artefarite burokrataj kaj militecaj) realaĵoj aperas kaj intermiksiĝas en koheran esperantistan (=internacian) tuton ŝajnas al mi belega, do mi esperas ne nur, ke ekde venontjare ni havos Katalunion en Pasporta Servo, sed ĉiujn aliajn (por kelkaj) harhirtigajn strangaĵojn, kiuj vivigas la homan kulturon.

Daniele Vitali
Italio



Kurte

Edmund Grimley Evans trovis ke duono de la tradukitaj romanoj kiujn li legis en Esperanto havas anglan tradukon kaj ke tiuj "ne estas pli bonaj ol la esperantaj tradukoj". Se estas tiel, tiam li elektas siajn esperantajn legaĵojn kun trafa gusto, ĉar esperantlingvaĵoj ne estas *générale* pli bonaj ol angligoj. Eĉ, mi timas ke la situacio estas ĝuste inversa: dum verkoj en la angla kutime almenaŭ ne pekas kontraŭ gramatiko, esperantaĵo lingve fuŝa ne estas raraĵo. Krome, laŭ Edmund la menciitaj anglaj tradukoj "ne estus facile akireblaj". Nu, ankaŭ esperantajn librojn oni ne aĉetas ĉe la stratangula tabakisto...

Mi legis en Esperanto lastatempe kvar romantradukojn. Ili ne ekzistas en mia lingvo, la hungara, krom *La kormoranoj ankoraŭ ne revenis*, ja verkita hungare. Sed dum la sama tempo mi konsumis krome 19 romantradukojn en aliaj lingvoj, el kiuj neniuj aperis en Esperanto. La proporcio 19:4 ne mirindas, se konsideri ke en 1991 kvin, en 1992 ok, en 1993 (ĝis nun) ok novaj romantradukoj estis ekvenditaj ĉe la libroservo de UEA. Ni estas malgranda popolo.

István Ertl

Mi antaŭ kelkaj jaroj tute ne vidis utilon de esperanta literaturo, kaj tute ne interesiĝis pri ĝi. Per Esperanto mi volis korespondi kaj vojaĝi. Entute mi ne interesiĝis pri beletro, ankaŭ ne nacilingva, kaj en Esperanto mi ne trovis same "bonajn" romanojn kun enigmoj, absorba historio, rapidaj situaci-ŝanĝoj. Almenaŭ tion mi kredis.

Nun mi vidas, ke ankaŭ la lingvo-kono estis problemo. Tiun problemon mi vidas ankaŭ ĉe aliaj esperantistoj: ni opinias la esperantajn librojn seninteresaj, ĉar estas malfacile legi en Esperanto, sed ni ne volas pli serioze studi, ĉar la libroj ne estas interesaj!

En lernado de vortoj ni kelkfoje estas pigraj. La esperanta gramatiko estas tiel simpla, ke oni povas paroli antaŭ ol havi tempon lerni tre grandan kvanton da vortoj. Tial ni ofte restas kun tre meza lingvo-kono, kiu sufiĉas por bazaj kontaktoj, sed ne por literaturo. Tamen ne necesas giganta laboro por lerni pliajn vortojn: sufiĉas legi tri-kvar librojn. Kompreneble tiuj unuaj provoj estos iom laboraj kaj nekontentigaj. Sed poste Esperanto iĝos vere dua lingvo, preskaŭ tiom proksima kiel la gepatre, kaj legado iĝos plezuro, nova vorto iĝos nova amiko.

Marion Grosjean
Svislando

TEJO estas la mondvasta tegmenta organizo por ĉiuj junaj esperantistoj. Ĝi havas 35 landajn kaj 2 fakajn sekciojn kaj 800 individuajn membrojn en la tuta mondo.

TEJO estas Internacia Neregistara Junulara Organizo (INJO) kiu havas bonajn rilatojn kun la Junularaj Fakoj de la Konsilio de Eŭropo kaj de UNESKO, kaj ankaŭ kun pluraj ne-esperantistaj INJOj.

TEJO, interalie, ĉiujare eldonas la novan liston de Pasporta Servo, komunikas al siaj membroj pere de la gazetoj *TEJO tutmonde* kaj *Kontakto*, engaĝiĝas en la organizado de la IJK kaj regule organizas TEJO-KER seminariojn.

Ni dungas plej eble baldaŭ kaj por la daŭro de prefere minimume tri monatoj

volontulon

en la Centra Oficejo en Rotterdam.

Ŝi/li legu la TEJO-poŝton, kiu alvenadas en la Centra Oficejo de UEA kaj plusendu ĝin al la koncernaj homoj. Ŝi/li mem respondu al simplaj demandoj kiel informpetoj pri Esperanto aŭ labortendaroj. Ŝi/li kunlaboru kun la TEJO-estraro kaj transprenu kelkajn taskojn de la estraranoj, ĉefe de la ĝenerala sekretario kaj de la KER-gvidanto.

Ni serĉas homon kiu havas bonajn konojn pri Esperanto kaj la Esperanto-movado. Krome necesas sufiĉaj konoj en la angla aŭ franca lingvoj por adekvate trakti leterojn.

Ni ofertas interesan kaj varioplenan okupon en la centro de Rotterdam kaj intiman kunlaboron kun la TEJO-estraro. La salajro sufiĉas por vivteni sin en Rotterdam.

Se vi interesiĝas pri tia laboro aŭ deziras pli da informoj, **ne hezitu!**

kontaktu Edlyn Teske, Albrechtstrasse 125, D-12165 Berlin, Germanio

Aliel ne eblas

Multfoje oni proponis enkonduki la tabelvortojn "alio, aliu, alia, aliel, alie, aliam, aliom, alial, alies". Mi nomas la uzantojn de tiuj novaj tabelvortoj "alielistoj", ĉar "aliel" estas la plej ofte uzata el tiuj vortoj.

En oficiala Esperanto ALI estas ordinara radiko, el kiu eblas fari vortojn per la ordinaraj finaĵoj: *alia* = ne la sama, ne identa kun (io), diferenca; *alio* = io alia; *alie* = en alia okazo, en alia maniero; *alii* = esti alia, diferenci (malofte uzata verbo).

La ekuzo de "aliel" ktp, kunportas drastajn ŝanĝojn en la lingvo. Multaj alielistoj konscias, ke *alie* ŝanĝas sian signifon al "en alia loko", sed la konsekvencoj estas multe pli grandaj ol tio.

kion signifas "alia"?

Alia en normala Esperanto signifas "de alia speco" aŭ "kun alia identeco". La nova tabelvorto "alia" signifus nur "de alia speco". Konsekvencaj alielistoj do ne plu diru: *La alia ĉambro estas pli granda*. Sed: *La aliu ĉambro estas pli granda*. Ili ankaŭ devus diri "Ili amas unu la alian".

Oni ofte faras kunmetojn kiel: *de alia speco* → *alispeca*, *kun alia formo* → *aliforma*, *en alia signifo* → *alisignife*. Alielistoj tamen devus diri: "aliuspeca, aliforma, alisignife", ĉar oni ne rajtas forstreki la "finaĵojn" de tabelvortoj. Komparu kun: *de tiu speco* → *tiuspeca* (ne: "tispeca"), *kun tia formo* → *tiaforma* (ne: "tiforma"), *en tiu signifo* → *tiusignife* (ne: "tisignife").



La ordinara *alie* povas signifi "en alia okazo" (*Mi ja bezonas manĝi, alie mi povas tute maldikiĝi.Z*), aŭ "en alia maniero" (*Mi ne povas agi alie.Z*) "Aliel" povas nur signifi "en alia maniero". Tamen multaj alielistoj uzas "aliel" ankaŭ por "en alia okazo". Logike ili devus tiam uzi "aliuokaze" aŭ "aliam". La vorto "aliel" estas ne nur reformo, sed eĉ mallogike uzata reformo.

ankaŭ "alies" ne eblas

Utila el la novaj tabelvortoj estus fakte nur "alies", kiu povus simpligi kelkajn pezajn frazojn: *Li ne uzis mian ĉambro, sed tiun de alia persono.* → "Li ne uzis mian ĉambro, sed alies." Por ĉiuj aliaj

novaj tabelvortoj Esperanto jam havas bonajn vortojn. La supozitaj avantaĝoj de la nova tabelserio estas do vere tre malgrandaj.

Tiuj ĉi reformproponoj tute ne venas de ia reala bezono, sed simple de la hazarda fakto, ke la radiko ALI finiĝas per "i". Se la vortoj estus ekz. *altra, altre, al-tro...*, verŝajne neniam venus al iu en la kapon, ke oni bezonus tabelvortojn por tio. Oni povas kompari kun la radiko SAM, kiu estas la malo de ALI. SAM ne finiĝas per "i". Sekve neniuj proponis diri: "*samel, samam, sames...*", kvankam la be-

zono de tiaj vortoj devus esti same granda, kiel la bezono de "*aliel, aliam, alies...*". La ŝajne senkulpa vorteto "*aliel*" kunportas tiom da ŝanĝoj en la lingvo, ke oni devas strikte deadmoni de ĝia uzo. Se senscia komencanto ĝin uzus, mi ne kolerus, sed kiam tre spertaj Esperantistoj faras tiajn senrespondecajn kaj senpripensajn reformojn, mi devas protesti. Feliĉe plej multaj Esperantistoj ankoraŭ uzas la lingvon regule kaj logike.

Bertilo Wennergren

Belartaj konkursoj de UEA en 1994

La Belartaj Konkursoj havis en 1993 unu el siaj plej bonaj rikoltoj de la lastaj jaroj. Plej elstare kontribuis junaj iberiaj aŭtoroj, kiuj konkeris ĉiujn premiojn de poezio kaj prozo. Eksterordinara estis la rezulto de kantoj. Tiu branĉo proponas nur unu premion, sed nur malofte oni trafis kanton, kiu meritis ĝin. En 1993 la premio eĉ devis esti dividita inter tri konkursaĵoj.

Proksimiĝas la tempo por sendi novajn konkursaĵojn. Ĉiuj konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, ne publikigitaj. Ekzistas la branĉoj:

- **Poezio:** maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.
- **Prozo:** maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.
- **Teatraĵo:** maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.
- **Eseo:** teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la 78-a UK.
- **Kanto:** teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj.
- **Vidbendo:** temo prefere ligita kun Esperanto. Ĝis 30 minutoj, VHS/PAL.
- **Infanlibro de la jaro:** originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1992.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por la sama branĉo. Ĉiuj alvenu en kvar ekzempleroj al la CO de UEA plej laste la 31-an de marto, kaj estu pseŭdonimaj, kun vera nomo kaj adreso en aparta koverto. Por infanlibro kaj vidbendo validas apartaj reguloj. Premioj ĝis 380 guldenoj. Detalan regularon petu de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.


+++tejo telegrame+++

+++ planatas fondo de eŭropa unuiĝo de esperantistaj kampademuloj +++ oni antaŭvidas komunajn kampadferiojn dum ĉiuj sezonoj en la tuta eŭropo +++ reagu ĉiuj aĝogrupoj +++ soluloj, paroj kaj familioj kun tendo, ruldomo aŭ loĝaŭto same bonvenaj +++ anoncu vin al lars böhmer, dahlerdyk 81 a, DE-47803 krefeld +++ telefono 02151-20546 +++

skandala uzo de la angla fare de alternativuloj +++ ekotopiaj realigas utopiojn +++ aktivaj ekologiistoj el la tuta eŭropo renkontiĝas en komunaj tenaroj por kunordigita agado +++ ĝis nun uzatas la angla +++ pliigu la kvanton de esperantistoj en la sekva tendaro en rumanio +++ kontaktu: e-junularo brandenburgio, berliner str. 49, DE-14467 Potsdam +++ tel. kaj fakso +49-331-24003 +++

latvia e-asocio informas +++ nuntempe estas ĉ.130 membroj +++ el ili 20-30 junuloj +++ ĉefe junuloj aperas ĉe tiuj kluboj, en kiuj oni instruas esperanton +++ en 1992 6 junuloj povis partopreni junularan renkontiĝon en germanio +++ ĉiujn elspezojn, inkluzive vojaĝon, oni pagis el germanio +++ al UKoj ĉiujare veturas 10-20 junaj esperantistoj +++ ĉefe liepajanoj, kiuj kantas kune kun fama aktorino austra pumpure +++ aparta junulara sekcio ĉe LEA ne funkcias, ĉar junuloj tamen ne estas multaj, kaj ili ĉiam povas partopreni la komunan aranĝon +++

+++ fondaĵo ivo lapenna subvencias disertaĵojn sur universitata nivelo +++ temu pri esperantologio aŭ esperanto en rilato kun interlingvistiko +++ en 1993 cent svisajn frankojn ricevis d-ro paola pruzzi por disertaĵo pri sintakso de la angla lingvo kaj esperanto +++ regularo ricevebla ĉe fondaĵo ivo lapenna, s-ro torben svendsen, vanløse allé 57, dk-2720 vanløse, danio +++ disertaĵojn sendu antaŭ la fino de februaro al klausperko, lendkai 11, a-8020 graz, aŭstrio +++



Jen vi vidas, pri kio revas la redakcia kato dum sia antaŭvespermaĝa dormeto...

en la sekva numero:

- **raporto el la IS**
- **somersezonaj informoj**
- **viaj leteroj kaj reagoj**
- **ĉu solidarecon?**